

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 222</i> <i>aprilo. / 2010</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 21-a jaro <a href="http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm">http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm</a></p>		

## Josip Pleadin (Kroatio)



### Malkvieta Animo

Ho, vi animo fajna, delikata,  
ho, vi kvieta mia amikin',  
kial ĉi-nokte en horo tarda  
el vi bruegas alia virin'?

Kial mi pensas pri alia  
viro en regiono trans landlimo?  
Kial vi tiklas mian spinon?  
Ĉu bridos vin la am-kutimo?

Ho, povra vi, mi ege hontas,  
mi ŝatus sveni pro la sent',  
mi volus esti eta polvo,  
forportu min al li la vent'.

Mi ŝatus tuŝi lian koron,  
nur por moment'  
nur por moment' ...  
Eble revenos al vi, animo,  
kviet' delikata kaj kontent'.



## Roberto Tresoldi (Italujo)



### Izolo

Krakadas la neĝo sub ŝuoj porvintraj  
dum vagas mi tage tra lando senhoma  
kaj vane esperas trovi la spurojn  
de amo perdita tra blovoj de l'vento.  
Ŝi volis foriri al ejoj vivplenaj,  
al urboj grandegaj, al homaj amasoj,  
al reva iluzio, riĉo kaj lukso,  
al firma laboro kaj bona asekur'...  
Ĉi tie izolo, malvarma vetero,  
ja bremsas la cerbon kaj blokas la movon,  
sed steloj dumnoktaj kaj suno reviga  
libere korektas la homajn difektojn.  
Kaj fuĝis ŝi foren, serĉante la vivon,  
la vokon de l' mondo ŝi varme akceptis,  
forĝesis ŝi tamen pri l' tempo praava,  
la tempo de l' homo ankoraŭ infana...  
Pri mia estonteco ofte mi pensas,  
pri neĝo abunda ĉe l' pordo de l' domo;  
mi viro senlaca ŝovele laboros,  
por fine solecan laŭiri la vojon.



## Cezar (Germanujo)



### Ĉu vi bluajn noktojn ŝatas?

Ĉu vi bluajn noktojn ŝatas,  
kiam neĝvual' surstratas  
kaj degel' kaj bototrem'?

Ĉu en frost' vi ŝatus kisojn  
el somera noktkampar',  
post la fajroj sentas misojn  
pro perdita trista jar'?

Mi, envintre en vojaĝo  
pensas pri la noktoblu'.  
Se frostiĝas la pejzaĝo  
revas mi pri ĝi kun ĝu'.

Ĉu en frost' vi revas kisojn  
en la nokto en solec'  
ĉe la fajr' de viaj misoj,  
se vin kaptis frost' sen dec'?

Mi, envintre en vojaĝo  
revas pri la noktoblu'.  
Ĉar plej gravas la kuraĝo  
serĉi amon plu kaj plu.



## Mikaelo Bronsxtejn (Rusujo)



### Printempo

Printempo alvenas ne haste,  
Tremante dum frosta aŭror',  
Kun ĝuo kaj kun embaras' de  
Postvintra vekigo de l' kor'.

Printempo alvenas sentriste –  
Senzorga, feliĉa fraŭlin' –  
Kun bona aŭgur', kun surpriz' de  
Jam tre forgesita inklin'.

Printempo alvenas tempeste –  
Eksente junaĝa maten' –  
Kaj mi ne scivolas pri prez' de  
Diluva droniga alven'.

15.03.2010

### Al la virinoj

Amante vante, kun naivo,  
Ni ĝuas vin dum nia vivo...  
La vivolibron indeksante  
Post retiriĝo de l' naiv',  
Por tagoj dolĉaj kaj amaraj  
Mi danku vin, ho miaj karaj,  
Kaj mi konfesu, vin kisante,  
Ke estas ĝuste vi – la viv'.

05.03.2010



## Milton Nascimento

# Korlando

tradukis **Wel (Brazilo)**



(kanzonteksto)

En la landinterno mia  
bieno estas ulo kun sindon' al grund'.  
Li la ŝuldojn ŝvitplenumis,  
kun zorgoj kiel se de li estus l' abund'.  
De la supro de l' monteto  
al vido l' verdamplekso el la terfekund'.  
Ul' fiero kun gitar',  
restu ŝpat' apud la ĉar'.

Blankula fil' kaj l' negreto  
laŭkuras tra la vojoj por la birdetar'.  
Tra l' plantejo re kaj reen  
sen kreskokozorgo tamen kreske la knabpar'.  
Bona fiŝ' en rivereto de akvo tiel pura  
videblas, kaj l' fund'.  
Historiojn ja volonte  
emas la ŝvitul' rakonte.  
Filo de l' mastro forvojaĝas.  
Tempo de plu-studo en la granda urbo.  
Iras. La okuloj tristas,  
jam la kompan' vidiĝas for en la stacio.  
Iam mi revenos, vin diras mi.  
Malaperas la trajneto laŭ vol' de Di'.  
Ĉe l' reven' jen li alia,  
kun li venis virineto, oni konu ŝin.  
Bela kiel hel' de luno,  
kiu landinterne estas nur fascin'.  
Jam nomiĝas li doktor',  
kaj nun en la bieno estos la sinjor'.  
Al la kora kamarado ludo nun estas... labor'.

tradukita el la portugala

## Anteo (Ĉinio)



# Virino = Suno

sen la suno, estas froste;  
kun la suno, varme;  
nubokovrita la ĉielo sentiĝas sufoka.  
sed kiel ajn, tio ja ne estas kulpo de la suno.

klimatizilo estas komandebla,  
sed ĝi multe elspezigas.  
la suno estas senpaga,  
sed ĝi agas nur laŭ sia plaĉo.

## Ĉineske

### Vejdo (Ĉinio)



# Aprilo

—laŭ ĉineska skemo Moyuer\*

aprilo  
gaze falas  
kviete leĝere  
kun ruĝo, verdo, flavo  
birdoj enaere  
fiere  
pepadas  
pri reviviĝ' libere  
sendanĝere  
viv' videblas jam  
moviĝante  
june surtere

aprilo  
alvenas mistere  
en koron pretere  
geamantoj en rendvu'

korverŝas sincere  
am-kvere  
sub arboj  
ŝajne Kupid' prefere  
memofere  
la gejunulojn  
en ĉi tempo  
ligas espere

*\*Moyuer (Fiŝado): ĉina fiksfoma poemo el du strofoj  
kun po 12 versoj de 346, 76, 3, 37, 4, 545 / 36, 6, 76, 3,  
37, 4, 545 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xa,a,xa,a,xxa /  
xa,a,xa,a,xa,a,xxa (x=snrima)*

en ĉi februar'  
  
frideta  
pluva flu'  
malsekas kun alglu'  
la harojn  
de knabin'  
atendanta lin

*Genglouzi (kanto de akva horloĝo en nokto): ĉina  
fiksfoma poemo el du strofoj kun po ses versoj de  
33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xbb  
/ xcc,xdd (x=senrima)*

## Cindy Mckee (Usono)



### Sonĝo de akvoguto

—laŭ ĉineska skemo Genglouzi\*

Guteto  
scintilas,  
silente oscilas  
sur sojlo.  
Sinnulo,  
nur mondspegulo.

Gutego  
graveda  
de bildo hereda,  
hezitas  
ĉe falo—  
ties realo.

### Eto(Ĉinio)

### Nokta pluveto

—laŭ ĉineska skemo Genglouzi

pluveto  
leĝere  
verŝiĝas libere  
en vento  
el la mar'



### Fasko da Busuanzi-oj\*

### Eto (Ĉinio)

### Soifa je akvo

sekeca monstro  
ĉerpas el infer'  
akvon en kampoj, putoj  
kaj longa river'

ĝi jen turmentas  
homojn en desper'  
jen pelas brutojn for de  
akvoriĉa sfer'

tero fendiĝas  
senakvas la lag'  
plantajoj mortas tute  
frenezas la plag'


ĉi' en okuloj  
videblas en svag'  
homoj, brutoj soifas

en nokto kaj tag'

veter' komplicas  
per senpluva lud'  
dum kelke da monatoj  
en la ĉina sud'

ni vere preĝas  
pri gracia altrud'  
pri plifrua ĉesigo  
de la monstra krud'

*\*En marto de 2010 okazas trosekeco en sudokcidenta parto de Ĉinio, senigante pli ol 20 milionojn da homoj je trinkakvo.*



## Cindy Mckee (Usono)

### Mi portus pluvon

Se mi nur povus  
mi portus pluvon  
al via trosekeco-  
renversus kuvon.

Sed mi ne povas  
sendi diluvon.  
Miaj malplenaj manoj  
oferas pruvon.

Amiko mia,  
la koro plenas,  
sed manoj kaj ĉielo  
ambaŭ malplenas.

Mi levas manojn  
kaj Dion ĝenas,  
ke li portu la pluvon.  
Nu, mi amenas.

## Eto (Ĉinio)

### Se mi estus Zeŭso

al plagita lok'  
mi kun volonto  
disverŝus savan pluvon  
el ĉiel-fonto

ĉar mi estus reĝ'  
de Olimp-monto  
mi ne lasus popolon  
en disaponto



## Viktoro (Ĉinio)

### Senkompata Ĉiel'

dum longa tempdaŭr'  
neniu pluvgut'  
sur fendiĝantan teron  
falas per elŝut'

senakvas river'  
sekiĝas la put'  
homoj, brutoj soifas  
en ĉiu minut'

palaj vizaĝoj  
kaj lipoj tremaj  
bezonas akvan duŝon  
pro brulo prema

homoj indignas  
kun sent' blasfema  
ve, senkompata ĉiel'

foriru kriĝema

ne daŭros plago  
kun senbrida ĝen'  
nur portempas sufero  
kaj sekeca scen'

homoj kuraĝe  
batalu kun pen'  
por liberigi nin de  
vetera katen'




## Vivsava pluvo

suferas longe  
pro sekec' la ter'  
homoj ankaŭ sopiras  
al pluv' kun esper'

plantoj kaj brutoj  
vivas en danĝer'  
trenas vegetadon en  
sufoka mizer'

feliĉe pluvo  
falas leĝere  
la vivsava pluvakvo  
nutras kulere

vivo revenas!  
ne plu mizere  
ni veas en senhelpec'  
nek plu sufero



*\*Busuanzi (Aŭguristo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 55, 75 silaboj kun duona rimo.*

## Eto (Ĉinio)

### Narciso

—laŭ ĉineska skemo Jianzi Mulanhua\*

kiel ino  
kvieta kun abstino  
akvon ŝatas  
la mondon fride gvatas

flavaj floroj  
pompas kiel dekoroj  
per aromo  
regas ĉambrojn de domo

## Cezar (Germanujo)

### Morta urbo

—laŭ ĉineska skemo Jianzi Mulanhua

Robotino  
sin venĝis ĝis la fino.  
Ĉiuj homoj  
formortis en la domoj

Urbo morta,  
nur verdokresk' senvorta.  
Nun formikoj  
sin setlas en fabrikoj.

*\*Jianzi Mulanhua (Mallongigita melodio magnolia): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.*

## Lily (Ĉinio)

### La Hirundo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

La hirund'  
sola kun sufer'

tagnokte  
 pensas izola:  
 vi neniam sentiĝu  
 iome senkonsola.  
 Ĉe mi memvola

restados  
 ja via nesto,  
 ĝis la varma sezono  
 revenos al ekesto  
 kun ĝoja festo...

Ĉi tie  
 ve, en aresto  
 alia bird' sin trovas  
 suferas de molesto  
 de l' rega pesto.

Al mi mem  
 vundas la dolor'  
 kruele senkomplete,  
 mia patri' en ĉi hor'  
 ankaŭ estas for.

Senhejme  
 mi tagojn trenas  
 mizere malfacile,  
 mia koro eltenas  
 tempdaŭr' min ĝenas.

Kara bird',  
 renkontiĝos ni  
 ambaŭ en fremda lando.  
 Mia sopir' al naci'—  
 la balzam' por mi.

*adaptita el kanzonteksto tradukita de Wel*



desegnita de **Eder Benedetti (Brazilo)**

## Niuniu (Ĉinio)


# Morto de poetino

—laŭ ĉinesko Yulinling\*

la poetin'  
 kun juna aĝ'  
 ĝis la vivfin'  
 jam laboris pene  
 dum tuta viv'  
 kun korinklin'  
 jen al poezio  
 verkis kun obstin'  
 serion  
 da poemoj  
 kun sublima sent-kombin'

poem-idojn post rafin'  
 ŝi naskis  
 el mensa uzin'  
 ilin ŝi trezoris  
 dorlote  
 kiel mem ŝin  
 sed, malfeliĉe  
 ŝin ja  
 mortigis heroin'  
 venena  
 la karier'  
 iris al ruin'

*Yulinling (tintado en pluvo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44, 44,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)*



## Vejdo (Ĉinio)

### Songô vaganta en la koro

—laŭ ĉineska skemo Yexingchuan\*

songô fulmas en la kor'  
tra jaroj  
el fremda for'  
sed nur fraŭlin'  
en mia songô'  
rolas kiel aktor'

sublune ĉe lekantflor'  
rigardas  
mi en lunglor'  
ŝian korpon  
seksallogan  
mi miras kun ador'

en lagakvo de aŭtun'  
ni naĝas  
nure en kun'  
en okuloj  
niaj ĉio  
fariĝas nulo nun

neste en mia brakum'  
ŝi ĝemas  
kun dolĉa zum'  
ni sentas nin  
ebriiĝa  
en feliĉa fortun'

jen en arbara kviet'  
ni kveras  
ĉe nokt-retret'  
mi deklaras  
amon al ŝi  
per firma ĵur-ripet'

ŝi jam kun voĉa falset'  
ekflustras  
per buŝ-almet'

"mi vin amas"  
malkaŝante  
vualon de sekret'

nun falas neĝo frida  
flirtanta  
kun insida  
blanka reto  
ŝi foriras  
kun mien' malfida

en sopiro senbrida  
mi tamen  
am-avida  
la esperon  
kovas ĉiam  
kun koro konfida

*Yexingchuan (nokta ŝipvojaĝo): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)*

## Anatole France (1844-1924)



### Domserva ŝtelo

Antaŭ proksimume dek jaroj, ĉu pli, ĉu malpli, mi vizitis porvirinan malliberejon. Ĝi estis malnova kastelo konstruita en la reĝado de Henriko la 4-a, kies altaj ardeztegmentoj superis sombran sudan urbeton ĉe riverbordo. Tia malliberejestro estis tuj atingonta emeritaĝon; li havis nigran perukon kaj blankan barbon. Li estis eksterordinara direktoro. Li pensis per si mem, kaj havis humanajn sentojn. Li ne iluziiĝis pri la moraleco de siaj tricent kunloĝantoj, sed li ne taksis ĝin iomege sub la moraleco de tri cent hazarde elektitaj virinoj el la urbo.



"Ĉi tie estas ĉiaj ajn homoj, kiel aliloke;" li ŝajnis diri min per sia dolĉa kaj laca rigardo. Kiam ni trairis la korton, longa vico da kaptitoj finis la silentan promenadon kaj reiris laborejen. Estis multaj maljunulinoj, kun krudaj kaj nefidindaj mienoj. Mia amiko Doktoro Cabane, kiu akompanis nin rimarkigis min ke preskaŭ ĉiuj tiuj virinoj havis karakterizajn difektojn, ke strabismo oftis ĉe ili, ke estis degenerintoj, kaj multaj el ili estis markitaj de stigmatoj de krimo aŭ almenaŭ de delikto.

La direktoro malvigle skuis sian kapon. Mi ja vidis ke li ne estas tre atingebla de la teorioj de la kriminalistaj medicinistoj, kaj li daŭre opiniis, ke en nia socio kulpuloj ne ĉiam malsimilegas senkulpulojn.

Li kondukis nin en la laborejojn. Ni vidis laborantajn panistinojn, lavistinojn, tolaĵistinojn. Laboro kaj puro preskaŭ ĝojiĝetis la lokon.

La direktoro bonece pritraktis ĉiujn tiujn virinojn. La plej stultaj kaj la plej malicaj nek senpaciencigis nek senbonkorigis lin. Li opiniis ke oni devas multe toleri de kunvivantoj, ke oni ne devas tro peti eĉ de deliktintoj kaj krimuloj; kaj, malkiel kutime, li ne postulis de ŝtelistoj kaj fiperantinoj, ke ili estu perfektaj ĉar ili estis punitaj. Li ne vere kredis je la morala efiko de punoj, kaj li malesperis transformi prizonon en virtolernejon. Ne opiniante, ke oni plibonigas homojn per suferigoj, li plejeble evitigis suferojn al tiuj kompatindaj virinoj. Mi ne

scias ĉu li havis religiajn sentojn, sed li ne donis ian ajn moralan signifon al la pekokompensa ideo.

"Mi interpretas la regularon, li diris al mi, antaŭ ol apliki ĝin. Mi mem klarigas ĝin al la malliberuloj. Ekzemple la regularo postulas absolutan silenton. Tamen, se ili absolute silentus, ĉiuj freneziĝus aŭ stultiĝus. Mi pensas, mi ja devas pensi, ke ne tion postulas la regularo. Mi diras al ili: "La regularo ordonas ke vi silentu. Kion tio signifas? Tio signifas ke la gardistinoj ne aŭdu vin. Se iu aŭdos vin, vi estos punataj, se neniu aŭdos vin, neniu riproĉos. Mi ne devas pridemandi viajn pensojn. Se viaj paroloj ne pli bruas ol viaj pensoj, mi ne devas pridemandi viajn parolojn." Tiel avertitaj ili klopodas paroli kvazaŭ sen elirigi sonojn. Ili ne freneziĝas kaj la regulo estas sekvata."

Mi demandis al li ĉu la hierarkiaj superuloj aprobas tian interpreton de la regularo.

Li respondis ke la inspektistoj ofte riproĉis al li; tiam li kondukis ilin ĝis la ĉefpordo, kaj diris: "Vidu tiun kradon, ligna ĝi estas. Se oni tie enŝlosus virojn, post ok tagoj neniu plu restus. Virinoj ne pensas pri eskapo. Sed pli singarde estas ne furiozigi ilin. La prizona reĝimo mem ja ne tre favoras ilian somatan kaj mensan sanon. Mi ne plu prizorgos gardi ilin, se vi trudos al ili la torturon de silento."

La flegejo kaj dormejoj, kiujn ni poste vizitis, lokiĝis en grandaj kalkoblankigitaj ĉambroj, kiuj plu konservis de pasinta splendo nur grandegajn grizŝtonajn nigromarmorajn

kamenojn superigitajn per pompaj plenreliefaj Virtoj. Justico, skulptita en proksimume 1600 far ia italinfluita flandra artisto, kun nuda brusto kaj femuro ekster la fendita tuniko, tenis per grasa brako siajn frenezigitajn pesilojn, kies teleroj tintadis kvazaŭ cimbaloj. Tiu diino direktis sian glavpinton al malsanulineto kuŝanta sur fera lito kaj matraco tiel maldika kiel faldita tuko. Ŝi aspektis same kiel infano.

“Nu, ĉu pli bone? Demandis Doktoro Cabane.

—Oh ! Jes sinjoro, ja pli bone.”

Kaj ŝi ridetis.

“Hej ! Ne petolu, kaj vi resaniĝos.”

Ŝi rigardis la kuraciston per grandaj okuloj plenaj de ĝojo kaj espero.

“Fakte, tiu etulino, ŝi estis tre malsana,” diris Doktoro Cabane.

Kaj ni pluiris.

“Pro kiu delikto, ŝi estis kondamnita?

—Ne pro delikto, pro krimo.

—Ha!

—Infanmortigo.”

Ĉe la fino de longa koridoro, ni eniris gajetan ŝrankoplenan ĉambreton, kies senkradaj fenestroj rigardis al la kamparo. Tie, junulino, belega, skribis ĉe skribotablo. Apud ŝi staranta belkorpa aliulino serĉis ŝlosilon en ŝlosilaro pendanta de ŝia zono. Mi volonte kredus ke ili estus la filinoj de la direktoro. Li informis min ke ili estas du malliberulinoj.

“Ĉu vi ne vidis ke ili havas la ĉidoman kostumon?”

Mi ne tion rimarkis ĉar ili ne portis ĝin same kiel la aliuloj.

“Iliaj roboj estas pli taŭgaj, kaj iliaj pli etaj kufoj videbligas la hararon.

—Fakte diris la maljuna direktoro, estas ja malfacile malhelpi virinon montri sian hararon, kiam ĝi belas. Tiuj ĉi estas sub la komuna reĝimo kaj devas labori.

—Kion ili faras?

—Unu estas arkivisto, la alia bibliotekisto.”

Ne indis demandi: ambaŭ estis “propasiaj”. La direktoro ne kaŝis al ni, ke al deliktulinoj li preferis la krimulinojn.

“Mi konas iujn, li diris, kiuj estas kvazaŭ fremdaj al siaj krimoj. Estis fulmo en ilia vivo. Ili kapablas rektecon, kuraĝon kaj donacemon. Mi ne samdirus pri miaj ŝtelistinoj. Iliaj deliktoj, cetere trivialaj kaj vulgaraj, teksas iliajn vivojn. Ili estas nekorekteblaj. Kaj tia malnobleco, kiu farigis al ili riproĉendajn agojn, ĉiam troviĝas en ilia konduto. La puno, kiu trafis ilin estas iom malgrava, kaj, ĉar ili estas korpe kaj morale iom nesensivaj, ili eltenas ĝin plejofte kun facileco.

“Ne dirende, li vigle pludiris, ke tiuj malfeliĉulinoj indus nek kompaton nek intereson. Ju pli mi vivas des pli mi konscias ke ne ekzistas kulpuloj, kaj ekzistas nur malfeliĉuloj.”

Li enirigis nin en sian kabineton, kaj ordonis al gardisto venigi la prizonulon 503.

“Mi tuj vidigis al vi spektaklon, kiun mi ne preparis, kedu min, kaj kiu certe inspiris al vi

novajn pripensojn pri deliktoj kaj punoj. Tion, kion vi vidis kaj aŭdos, mi jam vidis kaj aŭdis centfoje.”

Malliberulino kun gardistino eniris la kabineton. Ŝi estis juna kamparanino sufiĉe bela, kun milda simpla ĝentila mieno.

“Mi havas por vi bonan novaĵon, diris la direktoro. La moŝta Prezidanto de la respubliko, sciigita pri via bonkonduco, forviŝas la ceteron de via puno. Vi eliros ĉisabate.”

Ŝi aŭskultis gapante kun la manoj sur la ventro. Sed la ideoj ne rapide enkapiĝis en ŝi.

“Vi eliros venontan sabaton el tiu domo. Vi estos libera.”

Ĉifoje ŝi komprenis, ŝiaj manoj leviĝis pro angorplena gesto, ŝiaj lipoj ekstremis:

“Ĉu vere mi devos foriri? Tiam kio mi iĝos? Ĉi tie mi estis nutrita, vestita kaj ĉio. Ĉu vi ne povus diri al tiu bona sinjoro, ke estus pli bone se mi restus tie, kie mi estas ? “

La direktoro rediris al ŝi ke ŝi ne povas rifuzi la pardonon, kiu estis donacita al ŝi, kaj li informis, ke ŝi ricevos ian monsumon je ŝia foriro, dek aŭ dekdu frankojn.

Ŝi eliris plorante.

Mi demandis tion, pri kio tiu ĉi kulpis. Li foliumis registron :

“503. Ŝi estis servistino ĉe terkultivistoj...Ŝi ŝtelis subjupon de siaj mastro... Domserva ŝtelo...Vi scias, la leĝo severe punas domservan ŝtelon.”

Tradukis **la Liona loka klubo CERL (Francio)**

## Tri Fabloj de Liu Zongyuan\*

Elĉinigi **Minosun (Ĉinio)**



### Cervo en Linjiang

En Linjiang estis homo, kiu ĉaskaptis cervidon kaj volis ĝin bredi. Kiam li eniris kun la ĉasito en la domon, la hundoj ĉiuj kuris renkonte al li, salivantaj, kun svingantaj vostoj. Li koleris kontraŭ ili minacamiene. Ekde tiu tago li ofte alproksimigis al la hundoj la cervidon en siaj brakoj, por ke ili kutimiĝu al ĝi en amika etoso kaj iom poste ludu kun ĝi. Longan tempon poste la domhundoj kondukis tiel kiel la homo deziris. La cervido kreskis iom pli aĝe kaj forgesis sian specion, konvinkite, ke la hundo estas ja amika al ĝi. La cervo agis des pli senskrupule kaj eĉ batludis laŭplaĉe inter la dombestoj. Ili timis la mastron, ne aŭdacante ĝin mistrakti; sed de tempo al tempo ili lekigis sian langon laŭlipe.

Unu tagon post tri jaroj la cervo eliris. Ĝi vidis multajn fremdajn hundojn sur la vojo, dezirante iri al ili por sin ludamuzi. Ĝia aliro igis la hundojn kaj ĝojaj kaj koleraĵaj, kaj ili kune murdis kaj formanĝis la cervon. La restaĵo videblis en dispecoj sur la vojo.

La cervo, ĝismorte, ne rebrudentiĝis.



### Azeno en Guizhou

Origine ne estis azeno en Guizhou, sed enmiksigemulo transportis tien unu perŝipe. Ĉar ĝia ĉeesto utilis al nenio, do oni metis ĝin piedon de monto. Tigro vidis ĝin tiel mamuta,

